

## LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato  
Jarkolekto 2, N-ro 2 (9) : septembro-oktobro 2009

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: [pieter.doumen@adsl4you.be](mailto:pieter.doumen@adsl4you.be)

### Redaktore

*Karaj Legantoj,*

*Mi esperas, ke vi ĝuis agrablajn feriojn en-  
lande aŭ eksterlande, kaj ke vi akiris novajn  
freŝajn fortojn por repreni viajn profesiajn aŭ  
aliajn okupojn.*

*La lastan numeron de 'La Ponto' ricevis 205  
personoj. Multaj gratulis nin pro nia iniciato,  
kaj kelkaj sciigis al ni, ke ili ne deziras ricevi  
la revuon. Ne estas nia intenco altrudi ion ne  
deziratan. Bonvolu do pardoni al ni nian aŭda-  
con sendi al vi tiun revuon sen peto de via-  
flanke. Se vi ne deziras ricevi ĝin estontece,  
bonvolu sendi al mi mallongan retmesaĝon kaj  
mi forigos vian adreson el la adresaro.*

*Tri membroj de la Limburga Esperanto-  
Asocio vojaĝis al la Universala Kongreso de  
Esperanto en Bjalistoko, Pollando. La LKK,  
subtenata de la urba estraro, faris el tiu kon-  
greso unu el la plej grandiozaj iam. Okazis pli  
ol 240 prelegoj, kunvenoj ktp. Precipe la kon-  
certoj estis tre altkvalitaj. Entute 1860 espe-  
rantistoj partoprenis en ĝi. En tiu ĉi numero  
kaj la sekvanto vi trovos personajn impresojn  
kaj spertojn pri tiu neforgesebla semajno.*

*Ankoraŭ nun mi deziras al vi agrablajn  
legadon kaj tempopasigon kun nia revueto!  
Pieter Jan Doumen*

### Leteroj de D-ro L.L. Zamenhof

*(Brievan van Dr. L.L. Zamenhof)*

*Letero al A. Michaux del 21.02.1905 (2)*

Miaj Moskvaj kolegoj estis reprezentantoj de tre multaj plej diversaj rasoj, kaj tio ĉi fortiki-  
gis en mi la celadon al unuigita homa familio. Baldaŭ la financa stato de miaj gepatroj fariĝis tre malbona, ili ne povis jam tenadi min en Moskvo, kaj tial en 1881 mi revenis Varso-  
vion, eniris tie en la universitaton, kiun mi finis en la komenco de januaro 1885. Mi forverturis tiam en la vilaĝon Vejseje, por komenci kura-  
cistan praktikon. Praktikinte tie en la daŭro de

4 monatoj, mi konvinkiĝis, ke mi por la komu-  
na medicina praktiko tute ne taŭgas, ĉar mi  
estas tro impresiĝema kaj la suferoj de la mal-  
sanuloj (precipe de la mortantoj) tro multe min  
turmentis. Tiam mi revenis Varso-  
vion kaj decidis elekti por mi specialecon pli trankvilan,  
nome la malsanojn de okuloj. Mi laboris en la  
daŭro de 6 monatoj en la okulista apartaĵo de  
unu Varsovia malsanulejo, poste mi lernis kel-  
kan tempon en la klinikoj de Vieno (Aŭstrio)  
kaj en la fino de 1886 mi komencas okulistan  
praktikadon en Varsovio. Tiam mi konatiĝis  
kun mia edzino, Klaro Zilbernik el Kovno (ŝi  
tiam gastis ĉe sia fratino, loĝanta en Varsovio).



La UK en Antverpeno 1911

La 9-an de Aŭgusto 1887 mi edziĝis. Al mia  
fianĉino mi klarigis la tutan esencon de mia  
ideo kaj la planon de mia estonta agado. Kaj  
mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian  
sorton. Ŝi ne sole tute konsentis, sed ŝi donis al  
mia tuta dispono la sumon da mono, kiun ŝi  
posedis, kaj tio ĉi donis al mi la eblon, post  
longa vana serĉado de eldonanto, fine eldoni  
mem (en julio 1887) miajn unuajn kvar bro-  
ŝurojn (lernolibro de Esperanto en la lingvoj  
rusa, pola, germana kaj franca). Baldaŭ poste  
mi eldonis la "Duan Libron", "Aldonon",  
"Neĝan Blovadon" kaj "Gefratojn" (verkitajn  
de Grabowski), tradukon de la "Dua Libro" kaj  
"Aldono", Mezan Vortaron Germanan, Plen-  
an Vortaron Rusan, anglan kaj svedan lernoli-  
bron, Princinon Mary, Adresaron k.t.p., kaj mi  
ankaŭ donis la necesan monon por la eldono de  
la verkoj de Einstein kaj H. Philips. Mi ankaŭ  
donis multajn anoncojn al la gazetoj, dissendis  
grandan nombron da libroj k.t.p. Esperanto  
baldaŭ forglutis la pli grandan parton de la  
mono de mia edzino; la tutan reston ni baldaŭ  
formanĝis, ĉar la enspezoj de mia kuracista  
praktiko estis terure malgrandaj. En la fino de  
1889 ni restis se kopeko<sup>1</sup>!

<sup>1</sup> Rusa monero, centona parto de rublo.

Tre malĝoja estis tiam mia vivo. Mi devis forlasi Varsovion kaj serĉi mian panon en ia alia loko. Mia edzino devis forveturi kun mia infano al sia patro kaj mi veturis (en novembro 1889) al la urbo Ĥerson (suda Rusio), kie ne estis okulistoj, kaj kie mi tial esperis trovi panon por mia familio. Sed mia espero min terure trompis: miaj tieaj enspezoj ne sole ne donis al mi eblon nutri mian familion, sed eĉ por mi mem ili ne sufiĉis malgraŭ mia tre modesta kaj tre avara maniero de vivado! Mi simple kaj litere ofte ne havis eĉ kion<sup>2</sup> manĝi: Tre ofte mi restadis sen tagmanĝo! Nek mia edzino, nek miaj parencoj ion sciis pri tio, ĉar mian edzinon mi ne volis malĝojigi, kaj en miaj leteroj mi konstante konsolis ŝin, ke estas al mi tre bone, ke mi havas tre bonajn esperojn, ke mi baldaŭ venigos ŝin al mi k.t.p. Tamen fine mi ne povis jam pli elteni kaj mi devis konfesi al mia edzino mian tutan staton. Mi estis tiam ankoraŭ tro fiera, por akcepti de iu monan helpon; tamen la malĝojeco kaj la insistaj petoj de mia edzino devigis min akcepti monan subtenadon de mia bopatro (kiu tiam kaj ankaŭ poste neniam rifuzadis al mi sian helpon kaj elspezis por mi tre multe da mono) kaj mi revenis Varsovion, esperante, ke nun mia kuracista praktiko iros pli bone. En Majo 1890 mi revenis Varsovion.

Ankaŭ tiun ĉi fojon la espero min trompis. Miaj enspezoj tute ne pligrandiĝadis, miaj ŝuldoj krekadis. Fine ne havante jam la eblon pli atendi, mi en Oktobro 1893 transloĝiĝis kun mia familio en la urbon Grodno. Tie miaj enspezoj estis pli grandaj ol en Varsovio kaj la vivo estis malpli kara. Kvankam ankaŭ en Grodno miaj enspezoj tute ne kovradis miajn elspezojn kaj mi devis ĉiam ankoraŭ prenadi subtenon de mia bopatro, tamen mi pacience tenis min tie en la daŭro de 4 jaroj. Sed miaj infanoj pligrandiĝis kaj postulis pli koston edukadon, kaj la urbo Grodno estas tiel malriĉa, ke okulisto neniam povos tie multe pligrandigi siajn enspezojn, tial laŭ la insista deziro de mia bopatro mi en la fino de 1897 decidis denove reveni Varsovion kaj fari tie ĉi lastan provon.

La stato de mia animo estis tiam terura. Mi sentis tre bone, ke tio ĉi estas mia lasta provo, kaj se ĝi ankaŭ nun ne sukcesos al mi, mi estas perdita. En la daŭro de la unua jaro mi preskaŭ freneziĝis de malespero. Sed fine, dank'al la lasta streĉo de mia energio, la sorto komencis esti por mi pli favora. Baldaŭ mia kuracista

praktiko komencis pli kaj pli grandiĝadi kaj jam de la jaro 1901 ĝi estis tiel granda, ke miaj enspezoj tute kovras miajn elspezojn. Mi estis savita. Post multaj jaroj de granda suferado kaj batalado mi nun fine ricevis pli trankvilan vivon kaj havas tute sufiĉan panon por mia familio (kvankam kompreneble mi devas vivi tre modeste kaj kalkuli ĉiun kopekon). Mi loĝas en unu el la plej malriĉaj stratoj de Varsovio, miaj pacientoj estas homoj malriĉaj kaj pagas al mi tre malmulte; mi devas akceptadi 30-40 pacientojn ĉiutage, por havi de ili tiom, kiom aliaj kuracistoj havas de 5-10 pacientoj; tamen mi estas nun tre kontenta, ĉar mi havas mian panon kaj bezonas jam nenies helpon.


Mi havas nun 3 infanojn: unu filon kaj du filinojn [Adamo, Sofja kaj Lidja]. Mi estas tre laca kaj lacigis ankaŭ Vin per mia longa letero. Adiaŭ!

L.L. Zamenhof

## Novajoj el Esperantolando

*(Nieuws uit Esperantoland)*

**Anglio.** – *Originala literaturo en Esperanto.* – En 2008 aperis monumenta verko de Geoffrey Sutton (728 p.) pri la Esperanta literaturo. Ĝi estas la ĝis nun plej ampleksa monografio pri la temo, kaj iom mirige, ĝi estas anglalingva.




Kelkaj esperantistoj jam proponis, ke oni traduku la verkon "Concise Encyclopedia of

<sup>2</sup> Rusismo por: 'ion por'.

the Original Literature of Esperanto” al Esperanto, sed kompreneble la anglalingva versio povas atingi multe pli grandan publikon, kiu ĝis nun tute ne konsciis pri la ekzisto de esperantlingva literaturo. Plian paŝon direkte al sia potenciala publiko la elstara verko faris la 6-an de februaro, kiam en la pinte prestiĝa literatura revuo *Times Literary Supplement* aperis ampleksa recenzo de John Wells (antaŭa prezidanto de la Esperanta Akademio, *n.d.l.r.*).

*Libera Folio* publikigas la kompletan tekston de la recenzo. La traduko estas farita de Brian Moon kaj aprobita de John Wells. Legu la artikolon ĉe <http://www.liberafolio.org>.

*Ret-Info*, <http://www.eventoj.hu>



**Pollando 1.** – *Aŭkcio dum la UK en Bjalistoko.*

– La kremo de la bjalistoka aŭkcio aperis ankaŭ en la reto. Kvindeko da valoraj libroj, periodaĵoj k.a. interesaĵoj estis venditaj dum la aŭkcio de la Bjalistoka UK, kiu okazis sub la gvido de Humphrey Tonkin, vendredon, la 31-an de julio. Tiuj kiuj ne kongresis, povis konkursi retroŝte pri dek eroj de la aŭkcio. Kiam la surloka oferto en la UK haltos je iu prezo, oni kontrolis, ĉu estis ricevita rete pli alta oferto por la koncerna objekto. En tiu kazo la surloka proponinto rajtis ankoraŭ plialtigi sian oferton. Se gajnis la reta proponinta kaj la aŭkcio devis esti sendita poŝte, necesis aldone pagi la sendokostojn, krom se la prezo de la aŭkcio superis 100 eŭrojn.

(*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)

**Pollando 2.** – *Cirkla Panoramo en Wrocław ankaŭ en Eo.* – En la urbo Wrocław la Cirkla Panoramo pri la historia batalo apud Raclawice nun havas sian aŭdan programon ankaŭ en Esperanta versio, tradukita de Russ Williams

kaj Anna Skudlarska, provlegita de kelkaj alilandanoj, kaj bonkvalite voĉlegita kaj registrita de Aron Chapman ĉe Radio Verda. Ni vizitis lin hodiaŭ kaj vidis, ke ĝi estas instalita.

La sistemo estas tia, ke laŭtparoliloj aŭdigas polan priskribon de la cirkla pentraĵo, en kiu staras la vizitantoj. Alilingvanoj rajtas peti sonaparaton por aŭskulti tradukon en la angla, germana, ktp., tenante aŭskultileton en la orelo. Estas nur tri tiaj sonaparatoj kun la esperanto-sondosiero, do maksimume tri esperantistoj povas aŭskulti ĝin samtempe dum normala neantaŭaranĝita vizito (antaŭe oni aŭdis tra ili la ĉinlingvan version).

Sed se granda grupo da esperantistoj vizitos la lokon, ili rajtos peti, ke la laŭtparoliloj en la panoramo sonigu la Esperantan version anstataŭ la kutima versio. Tio ja okazis ĉi-semajne ĵaŭde posttagmeze pro vizito de esperantistoj en Wrocław dum la esperantista ekumena kongreso.

*Russ Williams*

**Germanio 1.** – *Esperanto dum honordoktoriga festo.*

– La ekonomika fakultato de la Universitato de Göttingen en Germanio distingis la konatan esperantiston kaj Nobel-premiitan profesoron Reinhard Selten per honordoktora titolo.



Dum la festa laŭdado prof-ino Claudia Keser (kiu iam mem eklernis Esperanton) diris kel-



kajn frazojn en bonkvalita Esperanto al la tuta aŭskultantaro.


La distingan sesion partoprenis eminentaj profesoroj el Germanio kaj eksterlando. Dum la festo oni kelkfoje menciis Esperanton. Eĉ sian fakan prelegon prof-ro Selten mem komencis en la Internacia Lingvo.

(IC en Herzberg)

**Germanio 2.** – *Turismaj saluttabuloj en Esperanto.* – Okaze de la aranĝo *Printempa Semajno Internacia* je Pasko 2009 kun partopreno de la gastoj de PSI estis inaŭguritaj du grandaj bonvenigtabuloj en Herzberg-Scharzfeld (vilaĝo kun la Unukornula Groto). La vilaĝestro Hubertus Kauczor tre gojis, ke post Herzberg, Sieber kaj Pöhlde nun ankaŭ lia vilaĝo bonvenigas la gastojn en la internacia lingvo Esperanto.

La 26-an de majo 2009 okazis la inaŭguro de la granda ligna bonvenigtabulo de la naciparka vilaĝo Lonau. Du reprezentantoj de la vilaĝa konsilantaro kaj amikoj de la Interkultura Esperanto-Centro de Herzberg same partoprenis.

Nun du belaj vilaĝoj de Herzberg tutjare varbas per Esperanto.



Amike salutas vin la Germana Esperanto-Centro, Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo <http://esperanto-urbo.de>.

*Ret-Info Eventoj, Hungario*

**Rusio 1.** – *Esperanto estas tuta mondo!* - La interreto konsiderinde kreskigis la eblecojn tutmonde korespondi per Esperanto. Tial la Koresponda Servo de [Edukado.net](http://Edukado.net) kreis novan retejon. Ĝia devizo estas “Эсперанто это целый мир!” (Esperanto estas tuta mondo!). Tiu relative nova rusa retejo troviĝas ĉe <http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/>


La enskribiĝo estas tre simpla. Preskaŭ ĉiu anonco havas foton de la korespondant(in)o. Nuntempe ĝi havas jam 38 grupojn kaj 557 individuajn korespondpetojn el 64 landoj. Estas do eble sur foto elekti vian korespondonton. La Koresponda Servo de [Edukado.net](http://www.EDUKADO.net/pagina/Koresponda+Servo/157//) : <http://www.EDUKADO.net/pagina/Koresponda+Servo/157//> . *Edukado.net*



**Rusio 2.** – *Furora informado pri Esperanto.* – Ĉirkaŭ la 15-a de februaro la konata krimea esperantisto Paŭlo Moĵajev faris furoran prezenton de Esperanto en la dua plej populara blogo de ruslingva interreto – tiu de Artemij Lebedev, la fama aspektigisto kaj skandala VivĴurnala uzanto. Pri tio informas la rusa la gazeto *Esperanto-novosti* sur sia paĝaro <http://www.e-novosti.info/blog/17.02.2009/2> .

Artemij Lebedev anoncis novan formon de sci-interŝanĝoj, kiam fakulo anoncas sian profesion, kaj interesiĝantoj demandas lin pri io ajn koncerne la fakon Moĵajev prezentis sin kiel profesia esperantisto (kio li fakte estas, enspezante, laŭ lia persona aserto, per Esperanto proksimume duonon de sia monata enspezo). La temo de Esperanto rezulte interesis publikon ne malpli, ol la najbaraj temoj (pri biokemio, bank-aŭtomatoj kaj ceteraj). Multaj demandintoj montris sin pensantaj homoj, sen preta antaŭjugo pri Esperanto. Dekoj ricevis trafajn respondojn de Paŭlo (al li kelkloke helpis la moskvano Maksim Griŝin).

Mi timas supertaksi la okazintaĵon, sed verŝimile estas la ĉefa ruslingva poresperanta evento de la monato februaro. Ĉar la diskuto restas konservita en la dua/tria plej populara blogo de rusa interreto, ĝi ankoraŭ longe efikos. *Vjaĉeslav Ivanov, Peterburgo*



**Francio 1.** – *Vinilkosma retejo kun MP3-servo.* – Post longa preparado finfine ni havas la plezuron anonci al vi, ke ni malfermas publike novan retejon (MP3-servo), komplementa al la jam konata [www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com), kiu ebligas al vi laŭleĝe elŝuti Esperantan muzikon.

La retejo evoluos plu ankaŭ en la venontaj monatoj, ĉar momente nur la kategorioj popo, roko, hiphopo, elektroniko kaj tradicia kanzono estas provizitaj per la eldonitaj albumoj de Vinilkosmo. Sekve la ceteraj albumoj de la katalogo de Vinilkosmo estos iom post iom aldonataj laŭ la interkonsentoj kun la artistoj.

Ni invitas vin viziti kaj malkovri tiun ĉi novan servon de Vinilkosmo, kaj antaŭ ĉio por bone kompreni, kiel funkcias la MP3-servo, bonvolu legi la “Helpkonsilojn” en la maldekstra menuo ĉe “Informoj”. Mi esperas, ke tiu nova retejo plaĉos al vi, kaj ke vi venos ofte viziti ĝin kaj sekvi, kiel ĝi evoluas...

*Floréal Martorell*

**Francio 2.** – *Propono favore al Esperanto.* – Marc Rousset, iama ĝenerala direktoro de la societoj Aventis, Carrefour kaj Veolia, proponas en sia libro *La nouvelle Europe – Paris-Berlin-Moscou* (La nova Eŭropo – Parizo-Berlino-Mokvo) fari el Esperanto la oficialan lingvon de Eŭropo. Tion li diris laŭ raporto de Sébastien Jalet en Radio Yvelines. Unu el la fortoj, sed ankaŭ la malfortoj de la Eŭropa Unio estas ĝia multlingvismo. Por malgravigi tion unu el la vojoj antaŭviditaj estas favori la disvolvadon de la angla. Tiun solvon Marc Rousset forĵetas. Pli temas laŭ li pri “sinliberigado el la angla-usona, kiu kontribuos al la malaperigo de ĉiuj naciaj lingvoj”.

*Henri Masson*

## Hejmeca kradrostado

*(Gezellig barbecuen)*

Denove estas la tempo de kradrostado. Tio signifas: malstreĉaj posttagmezoj kaj vesperoj en la ĝardeno en kompanio de familianoj aŭ amikoj. Kaj kune reiri al niaj ‘radikoj’...

Kradrostadon kiel familian okazaĵon ni transprenis de la usonanoj. Jam en la dek-sepa jarcento kradrostado estis populara en la sudo. Kelkaj konsiloj...

### Tenu ĝin sekura

Abundas kradrostadiloj de ĉiaj specoj kaj mezuroj. Kiun ajn aparaton vi havas – vi povas ankaŭ kontentiĝi per kelkaj ŝtonoj, sur kiujn vi metas kradon –, atentu, ke via kradrostilo estu stabila kaj staru sur ebena grundo. Metu ĝin ekster vento, for de pendantaj plantoj kaj arbustoj. Tenu infanojn kaj hejmbestojn for de la kradrostilo.

Koncerne la bezonatan materialon, prefere tenu la sekvantajn objektojn manatingeblaj: lignokarbo, ekbruligbloketoj aŭ -pasto, fornogantoj, antaŭtuko, kradprenilo aŭ granda forko, bovloj, kelkaj tranĉotabuletoj kaj tranĉiloj. Soteleto kun sablo estas utila por plenumi eblajn estingolaboretojn. Estingi per akvo kaŭzas ŝprucmakuletojn kaj estas danĝere. Soteleto kun akvo estas tamen utila, se vi bruligas vin mem.

Prefere ne uzu lignon sur la kradrostilo. Se vi tamen uzas ĝin, evitu lignon kiu ne estas tute sekan, kun farbovestoj aŭ kiu enhavas multan rezinon. Brulantaj rezinoj faras la manĝaĵojn malbongustaj kaj eĉ nocas vian sanon.

### Du zonoj

Kradrostado postulas multan tempon. Vi do komencos sufiĉe frue antaŭ la manĝo. Se vi uzas lignokarbon, vi devas enkalkuli preparatempon de almenaŭ 40 minutoj, antaŭ ol la fajro estas preta por komenci la rostadon. Konkrete la ĝusta rosttemperaturo estas atingita, kiam vi ne plu vidas flamojn, sed jes maldikan tavolon da cindroj sur la ardanta lignokarbo. Faru du zonojn: unuflanke la pli varmega zono kun dika tavolo (15-20 cm) da ardanta karbo, aliflanke pli maldika tavolo. La pli varmega zono servas por la ekrostado de la viandaĵoj aŭ fiŝaĵoj. Tiel la suko restas



en ili, kio favoras ilian sukecon kaj guston. La plua plenrastado fariĝas en la dua zono. Se la kradrostado daŭras longe, povas esti necese aldoni lignokarbon. Aldonu ĝin en la trankvila flanko kaj poste ŝovu ĝin al la pli varmega zono.



### Evitu fumon kaj flamojn

Estas grave, ke falu kiel eble malplej da graso aŭ malsekaĵo en la fajron, tio por eviti flamojn, kiuj forbrulas la manĝaĵon. Tial bone sekigu ilin, kiam ili estis marinitaj, kaj estu ŝparema pri oleo, kiam vi ŝmiras per ĝi viandon aŭ fiŝaĵon. Nur pecoj kiuj rapide algluas al la krado devas esti ŝpare ŝmiritaj per oleo antaŭe. Por eviti forbruligon, vi devas returni tre regule kaj preskaŭ daŭre tion kio troviĝas sur la krado. Forbruligita viando estas kancerogena. Sed kradrostado certe estas saniga, se oni la procedas precize. Precipe zorgu pri varieco, la ŝlosilo al saniga manĝo. Viando certe estas la ĉefa ingredienco, sed ĝi ne devas esti la sola. Ankaŭ fiŝaĵo kaj terpomoj povas esti preparataj sur kradrostilo, kaj memkompreneble vi ankaŭ surtabligas freŝajn legomojn kaj panon.

(Trad. P.J.Doumen)

### Rakonto (verhaal):

#### La Amromano de Alfred Nobel (De liefdesroman van Alfred Nobel)

El la kvin Nobel-premioj la plej konata estas tiu de paco. Ĝi estas ankaŭ la plej populara, kvankam ĝi neniam povis kontribui al la antaŭenigo de pacifismo en la mondo. Oni ofte aŭdas, ke Nobel fondis tiun premion pro konscienciproĉoj pro la nuligo de la multaj homaj vivoj, kaŭzita de liaj inventaĵoj.

Tio ŝajnas malmulte probable. Nobel estis cinikulo kaj realisto, kiu ne faris al si multajn zorgojn pri la sorto de siaj proksimuloj. Kiam

en 1864 lia frato estis mortigita, testante novan eksplodaĵon, lia unua reago estis: "La stultulo! Li certe tro varmigus la nitroglicerinon!"

Unu el liaj favorataj diraĵoj estis: "Oni ne devas imagi, ke estas eble enkonduki novan eksplodaĵon en la merkaton sen kaŭzi la morton de nombro da viktimoj." Nobel estis tro prudenta viro por dorloti 'la grandan iluzion' de la interfratiĝo de la popoloj kaj nacioj. Longe antaŭ la fondo de siaj famaj premioj li donis sian opinion pri la temo: "La sola rimedo por aboli militon estas la fabrikado de tiel fortaj eksplodaĵoj, ke la homoj ne plu kuraĝos batali pro la timo ekstermi sin reciproke." La hodiaŭa nuklea ekvilibro pruvas la escepte klaran rigardon de Nobel.



### Bertha von Chinie

Estas tre verŝajne, ke la historio de la pac-premio komenciĝis per malgranda klasika anonco en iu gazeto: "Grandaĝa viro, tre riĉa kaj kultivita, deziras konatiĝi kun mezaĝa sinjorino, kiu parolas plurajn fremdajn lingvojn, povas fariĝi lia sekretariino kaj okupiĝi pri la dommastrumado."

Tiu anonco aperis en la "Neue Freipresse" (Nova Libera Gazetaro) de Vieno. La anonco altiris la atenton de Bertha Kinsky von Chinie, aŭstra grafino, kies familio estis ruinigita kaj kiu laboris ĉe barono von Suttner kiel instruistino de liaj kvar infanoj. Bertha enamiĝis



al unu el la filoj de la barono, la dudekjara Arturo, kiu estis ja sep jaroj pli juna ol ŝi. La amo estis reciproka, sed la gepatroj de Arturo oponis sin al la geedziĝo pro la granda diferenco de aĝo. Tuj kiam Bertha legis la anoncon en la gazeto, ŝi respondis al ĝi kaj prezentis sian ekziĝon al la barono. La numero de la anonco kondukis al Alfred Nobel, kiu dungis ŝin kaj enamiĝis al ŝi.



Kvankam la amo inter ili enhavis nenion eksplodeman, Nobel dankis al ŝi la plej feliĉan el la malmultaj feliĉaj periodoj en sia vivo. Kiam Bertha forlasis lin por edziniĝi en Vieno al la juna barono Arturo von Suttner, kiu intertempe estis alveninta al la konvinko, ke li ne povas vivi sen ŝi, Nobel sentis nenian rankoron. Li efektive estis ankaŭ tre realisme koncerne la virinan animon. Bertha von Suttner konservis ampleajn memoraĵojn pri la maljuna magnato. Nobel siaflanke plu atestis pri la tenera amikeco, kiun li sentis por ŝi kaj kiu daŭris ĝis la fino de lia vivo.

En 1891 Bertha von Suttner skribis sian pacifisman romanon *Die Waffen nieder!* La sukceso estis enorma. La libro estis tradukita en plurajn lingvojn, ankaŭ en Esperanton sub la titolo *For la Batalilojn!* Nelonge poste ŝi fondis en Vieno, dum pacifisma kongreso, en kiu Nobel partoprenis inkognita, la Societon de la Amikoj de Paco. En 1893 Nobe sendis leteron al Bertha, en kiu li anoncis al ŝi, ke li postlasos per testamento parton de sia enorma riĉaĵo por fondi ĉiujaran premion destinitan al la viro aŭ virinio, kiu plej kontribuis al la progreso de paco en Eŭropo. Sen ia dubo Nobel volis komprenigi per tio, ke baronino von Suttner estos la unua persono ricevonta tiun prestiĝan premion. Ŝi tamen ricevis ĝin nur en 1905, naŭ jaroj post la morto de Nobel.

### Riĉa sed soleca

Aparte de kelkaj intermezaj amo ne okupis vastan lokon en la koro de Alfred Nobel. Li neniam edziĝis. Eble li ne faris al si pli da iluzioj pri paco en la familioj ol inter la nacioj. Malgraŭ lia enorma riĉeco, neniu virino staris ĉe lia mortlito en sia imensa vilao en San Remo, Italio. Simpla servisto malkovris lin en la mateno de la 10-a de decembro 1896, soleca en la morto, kiel li plej ofte estis dum sia vivo.

Naskiĝinta en Stokholmo la 21-an de oktobro 1833, Alfred Nobel estis malsanema infano. Krom kun sia granda intelekto li naskiĝis ankaŭ kun aliaj avantaĝoj. Lia patro, riĉega fabrikanto, havis la rimedojn edukigi lin fare de privataj instruistoj, kiuj donis al li vastan, ĝeneralan formadon. Je sia dek-kvina jaro li parolis la svedan, rusan, francan, anglan kaj germanan lingvojn. Tiam la familio loĝis en Sankt-Peterburgo (Rusio), kie la patro faris torpedojn por la ŝiparo de la caro. Kiam lia filo estis deksepjara, li sendis lin fari studvojaĝon tra Eŭropo kaj Ameriko. En la daŭro de tiu vojaĝo Alfred vizitis multajn fabrikojn kaj laboratoriojn, kie li akiris, krom vasta sperto pri la internacia mondo kaj frutempa inklino al aferoj, ankaŭ vastan konon pri kemio.



### Ne preparita artfajraĵo

Kiam en 1851 li revenis al Rusio, Alfred Nobel konatiĝis kun nitroglicerino danke al iu profesoro en Sankt-Peterburgo, kiu kaŭzis malgrandajn eksperimentajn eksplodojn, frapante per martelo sur fluidaĵo, inventita de la itala kemiisto Ascanio Sobrero. Tiu ĉi preparis olecan fluidaĵon, verŝante gliceridon sur miksaĵon el sulfuracido kaj nitratacido. Tiun ĉi produkton li nomis 'piroglicerino' pro ĝiaj brul- kaj esplodkvalitoj. Sed la itala kemiisto ne sukcesis bridi sian nestabilan kaj danĝeran eksplodaĵon, kaj tial lia inventaĵo trovis nenian praktikan aplikon.

(Daurigota)

## Mia UK de Esperanto en Bjalistoko (Mijn Esperantowereldcongres in Bialystok)

Por la ĉi-jara Universala Kongreso oni elektis Bjalistokon, ĉar en tiu ĉi urbo naskiĝis D-ro Zamenhof la 15-an de decembro 1959, do antaŭ

150 jaroj. Ĉar oni povas legi aliloke raportojn pri la kongresaj aktivaĵoj, mi priskribas ĉi tie nur miaj personojn spertojn kaj impresojn.

Verhoog je koopkracht met je internet en telefoonaansluiting!

ADSL4you  
Internet en vaste telefoon

T. 028883350 | E. info@adsl4you.be

4 adsl4you.be

Scherp geprijsde adsl-aansluiting en  
**GOEDKOOP  
TOT GRATIS**  
bellen met internettelefonie

Bel: 02 8883350

Je la 3-a de vendredo, la 24-a de julio, taksio venis preni nin – Pieter Doumen, Rik Leijskens kaj Henri Schutters – en la domo de tiu ĉi kaj veturis nin al la fluhaveno de Düsseldorf. Tie ni prenis aviadilon je la 6h50 al Varsovio, kie ni alvenis je la 8h30. Ni do iris unu tagon pli frue al Varsovio por viziti tie la judan tombejon, kiu mezuras pli ol 30 ha, kaj la tombron de D-ro Zamenhof. Post nia instalado en hotelo Ibis, esplorado de la kafetario kaj tagmanĝo, ni iris piede al la judo tombejo, sed ne sukcesis trovi ĝin. La eta mapo de la urbo de Henri ne helpis nin. Ni do eraris kaj haltigis taksion, kiu veturigis nin tien. Sed, alveninte, ni konstatis, ke la tombejo, kiu estis ĉirkaŭita de tre alta brika muro kun nur unu pordego, estis fermita. Ni povis admiri ĝin nur tra fendo en la fera pordego. Ni eksciis poste, ke la tombejo estas malfermita ĉiusabate de la 9-a ĝis la 13-a. Tial ni reiris taksie al la malnova urbo, kie ni admiris la multajn tre belajn konstruaĵojn, inter kiuj

la barokstilan karmelitan preĝejon, gustumis la tiean bieron kaj vespermanĝis en restoracio kun tipe polaj pladoj. Ĉar ni preskaŭ ne dormis la antaŭan nokton, ni frue enlitiĝis. Sabate matene ni frue ellitiĝis kaj prenis je la 9h25 la trajnon al Bjalistoko, 150 km pli orienten. Alveninte tie je la 11h45, ni iris taksie al nia hotelo Golebiewski en la urbocentro,

Golebiewski, kvarstela hotelo, ne estis nia unua elekto, sed oni sciigis al ni unu monaton antaŭe, ke oni translokis nin al tiu hotelo, ĉar la hotelo de nia unua elekto jam estis okupita. Ni povis loĝi en tiu hotelo ne nur je la sama prezo, sed eĉ je reduktita prezo, certe pro la valormalpliigo de la pola zloto kontraŭ la eŭro sekve de la tutmonda krizo. Golebiewski estas grandega kaj vere luksa hotelo. Rik ricevis unulitan ĉambron, kaj Henri kaj mi dulitan, t.e. oni simple metis duan liton en unulitan ĉambron, tial ke preskaŭ ne estis spaco inter la du litoj!

Bjalistoko estas sufiĉe bela urbo je 20 km de la belorusa limo. Ĝi havas ĉirkaŭ 300.000 enloĝantojn, impresas moderne kaj tre agreable kaj estas tre pura kaj sekura.



Ni tagmanĝis en pola-meksika restoracio tuj apud la hotelo kaj iris taksie al la Politeknika Altlernejo, kiu estis servonta kiel kongresejo kaj troviĝis je 3 km de la hotelo.

En nia hotelo ni renkontis Hans Adriaanse el nederlanda Limburgo, kiu legis en pola gazeto, ke vandaloj atakis kaj eble forbruligis la salomon Zamenhof, grandan tendon (por 2000 personoj) kie estis okazonta i.a. la malferma ceremonio. Sed alveninte tie, ni kun ĝojo trovis la tendon netuŝita aŭ ebla jam riparita. Ni tuj iris al la akceptejo, kiu troviĝis en la dua konstruaĵo, kie ni ricevis nian nomŝildon kaj la tradician sakon kun la kongresa libro kaj diversaj aliaj dokumentoj. Post tio ni malsupreniris en la keletaĝon, kie oni instalas restoracion. Ni ordonis kafon kaj konatiĝis aŭ rekonatiĝis kun



aliaj partoprenantoj. Tie mi revidis la 91-jaran anglon Charles Alan Shrives, certe la plej aĝan kongresanton, kaj lian filinon Sara Jane, kun kiuj mi konatiĝis la antaŭan jaron en Roterdamo. Li parolas kun grava angla akĉento.

Je la sesa ni iris al la salono Zamenhof por ĉeesti koncerton de pola junulara koruso – 12 knabinoj kaj 2 knaboj –, kiu kantis plurajn belajn modernajn kantojn. Kvin el ili kantis ankaŭ soliste. Ilia perfekta prezentado imponis ĉiujn ĉeestantojn.



Je la sepa ni spektis samloke la teatraĵon *Bjalistoka Babelo*, kiu prezentis la lingvan situacion en Bjalistoko, kiun Zamenhof konis en sia junaĝo. Nigrevestita viro, eble aktoro, deklamis tekstojn en la pola, tradukitajn Esperanten tuj poste, dum junuloj kaj infanoj en folkloraj vestoj ludis scenojn sur la vendoplaco de Bjalistoko, senvorte vendante kaj aĉetante, ĉar la tiamaj bjalistikanoj ne komprenis sin. Inter du scenoj ili kantis kaj dancis kune. Intertempe komencis plui ekstere, kaj la temperaturo en la tendo senteble plialtiĝis, tiel ke al Rik kaj mi, kiuj estis sen jakoj, fariĝis malvarme.

Dimanĉe je la deka komenciĝis la ceremonio de la solena inaŭguro de la kongreso kun multaj paroladoj kaj denova prezentado de la junulara koruso, kiu nun kantis Esperante. La granda tendo estis preskaŭ plena. Sur grandaj ekranoj la publiko kiu sidis for de la podio povis bone sekvi la tutan solenaĵon, kiu plurfoje estis emocia.

Post manĝo en la tendo-restoracio, kiu staris apud la tendego Zamenhof kaj havis du kuirejojn, Rik reiris al la hotelo, kaj Henri kaj mi vizitis je la 13-a la libroservo de UEA, estrata de Ionel Ionet. Tie jam troviĝis pluraj pakoj kun ekzempleroj de 'Renardo Vulpo', mia traduko de la flandra mezepoka bestepopeo 'Van de Vos Reynaerde'. Ionel, nome de UEA vendis ĝin dum la kongreso kaj poste vendos ĝin en Roterdamo. Ni promenis tra la salono rigadante la librojn, kiuj estis ekspoziciataj laŭteme. Ni ankaŭ aĉetis kelkajn librojn.


'Morto de Artisto', la nova romano de Anna Löwenstein, ankaŭ estis lanĉita tie, sed jam elĉerpiĝis la unuan tagon.

Post tio ni iris al la salono Lapenna por aŭdi la prelegon pri la kutimoj de la poloj, kiu estis simple laŭtlekata de virino per monotona voĉo. Kelkaj personoj ekdormis, aliaj, ankaŭ ni, foriris antaŭ la fino.

Je la 4-a ni reiris al la sama salono, kie okazis tri prelegoj pri prof. Ivo Lapenna, iama sekretario kaj poste prezidanto de UEA dum multaj jaroj. Danke al lia granda oratora talento Unesco rekonis en 1954 la meritojn de UEA kaj konsilis al la landoj-membroj enduki Esperanton en la lernejojn, kio tamen ne okazis.

(Daŭrigota)

La vendo de la Esperanta versio de la fama flandra mezepoka bestepopeo titolita 'Renardo Vulpo' estis lanĉita dum la UK de Esperanto en Bjalistoko en la libroservo de UEA. Post la kongreso ĝi estas mendebla ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015BJ Roterdamo. Sufiĉas simpla sendo de retmesaĝo al ĝia respondeculo, Ionel Ionet [ionel@co.uea.org](mailto:ionel@co.uea.org).  
Prezo: € 15 kun sendokostoj.



## **Programo de la Limburga Esperanto-Asocio por la venonta laborjaro** *(Programma van de Limburgse Esperantovereniging voor het komende werkjaar)*

Dum la kunveno de la estraro de LEA la 26-an de aŭgusto oni decidis fari kio sekvas:

### A. Letero al la eŭroparlamentanoj

Respondante al la alvoko de S-ro Seán Ó'Riain, prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio, sendi leteron al la eŭroparlamentanoj kun demandoj pri la maljusta lingvopolitiko de la administracio de la EU (vidu la revuon 'Esperanto' de aprilo 2009, p. 91), la estraro decidis sendi tian leteron al la belgaj eŭroparlamentanoj kaj inviti la aliajn asociojn aŭ kluboj en Belgio kaj Eŭropo fari la samon. Ĝi petos ilin respondi antaŭ la 31-a de decembro 2009. Post tiu dato la respondoj estos analizitaj kaj publikigitaj por informi la ĝeneralan publikon. La letero estos sendita proksimume je la 15-a de septembro 2009.

### B. Jarprogramo de la aktivaĵoj de LEA

La kunvenoj de la membroj de LEA okazos la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato (escepte en decembro) en lokalo de la kultura centro de Peer 'de Schans' de la 20-a ĝis la 22-a horo. La programo estas provizora, ŝanĝoj povos do okazi. La programo, eventuale kun ŝanĝoj, aperos en nia dumonata revueto 'La Ponto'. Ĉiuj esperantistoj estos tutkore bonvenaj!

24.09.2009: Prelego pri la Universala Esperanto-Kongreso en Bjalistoko far Henri Schutters  
29.10.2009: Skrabloludo gvdota de An Olijslagers  
26.11.2009: Prelego pri la Antikvaj Belgoj far Pieter Jan Doumen  
17.12.2009: Ĉiujara Zamenhoffesto, organizota de Rik Leijskens; bonvenas ĉiuj esperantistoj kun sia partnero; detaloj estos publikigitaj en la sekvanta numero de 'La Ponto'  
28.01.2010: "Serĉu la vorton", vortludo organizota de Henri Schutters  
26.02.2010: Prelego pri Esperanto en Valonio far Marcel Delforge (kontakto: P.J. Doumen)  
26.03.2010: Kantovespero (kunkantado kaj kantado far Paul Hotterbeekx)  
30.04.2010: Prelego de Rob Ketelaar pri sia interesa hobbio (kontakto: An Olijslagers)  
27.05.2010: Promeno kun ĉiĉerono tra Peer, ankaŭ por neesperantistoj (kont.: H. Schutters)  
24.06.2010: Globludo ('pétanque' aŭ 'jeu de boules') hejme ĉe Pieter Jan Doumen  
Kanuado sur Dommel organizota de Paul Hotterbeekx en iu sabato en printempo.

La estraro decidis partopreni en

- la Turisma Borso de Peer en februaro 2010 kun stando;
- la Eŭropaj Komercaj Tagoj en Neerpeelt la 2-an aŭ 3-an dimanĉon de majo;
- fari viziton en printempo al la Esperanto-urbo Herzberg en Germanio;
- serĉi urbeton en Ĉeĥio, Slovakio aŭ Pollando por interfratiĝi kun lokaj esperantistoj.

### C. La Kursoj

La informa vespero okazos la 17-an de septembro.

La kurso por komencantoj estos gvidata de Henri Schutters en lokalo de la K.C. de Peer 'de Schans' (escepte kiam okazos kunveno de LEA) de oktobro 2009 ĝis inkluzive junio 2010.

La kurso por progresintoj estos gvidata de P.J. Doumen en la hejmo de Paul Hotterbeekx, Hamonterweg 169 B2, 3930 Achel, kaj okazos en la samaj momentoj.

La kursoj estos gvidataj laŭ la rekta metodo (metodo Cseh) kun emfazo sur la parola lingvo. Ĉiuj personoj kiuj iam sekvis Esperantan kurson kaj deziras refreŝigi siajn konojn de la lingvo, rajtas sekvi tiujn kursojn SENPAGE. Ĉiuj estas tutkore bonvenaj! Ne hezitu!